

TRI GRANDAJ ORIENTAJ POETOJ FORPISIS en 2008

En 2008 koincidis la morto de tri gravaj rusaj verkistoj:

La 14an de majo 2008 mortis en Sankt-Peterburgo la ĉukĉa verkisto Juri Rytchëu, kaj la 10an de junio 2008 mortis en Nurenbergo la kirgiz-devena verkisto Ĉingiz Atmatov. La 3an de aŭgusto 2008 forpasis en Moskvo la nobelpremiito Aleksandr Solĵenicyn.

De Andreas Künzli

Juri Rytchëu (ĉukĉe kaj ruse Ю́риј Серге́евич Рытхэу) 1930-2008

Naskita kiel filo de ĉukĉa ĉasisto kaj eskima patrino la 8an de marto 1930 en Uĉelen, en sia infanaĝo Rytchëu vivis en jarango, la tradicia tendo kun rosmara felo. Uĉelen estas la la plej nordorienta punkto de Siberio, sur la Ĉukĉa Duoninsulo, ĉe Kap Deĵnjov apud la Beringa Markolo proksime de la polusa cirklo. La naskiĝjaro de Rytchëu koincidis kun la jaro, kiam estis fondita la Nacia Cirklo de la ĉukĉoj. Tio radikale ŝanĝis la vivon de la rangiferaj nomadoj sur la eterna glacio. La jarangoj estis abolitaj kaj anstataŭitaj de betonaj platdomoj, la nomadismo iĝis malpermesata. Por la lokaj homoj tiu reformo signifis kulturŝokon.

Pasiginte sep lerneajn jarojn surloke, Rytchëu deziris daŭrigi sian edukadon en la Instituto pri nordaj popoloj en Leningrado, sed li estis tro juna kaj ne trafis al tiu lernejo. Tial li decidis memstare veturi al Leningrado por studi. Por perlabori monon li plenumis diversaj laborojn: jen kiel matroso, jen kiel akompananto de geologia ekspedicio, jen en bestkaptado aŭ kiel portisto. Translokiĝante al Anadyr, la regiona ĉefurbo de Ĉukĉio (Ĉukotka), li fariĝis en 1947 kunlaboranto de la loka gazeto ‚Sovetskaja Ĉukotka‘, en kiu li publikigis siajn unuajn verkprovaĵojn. En Anadyr li konatiĝis kun la leningrada sciencisto Pjotr Skorik, kiu gvidis lingvistikan ekspedicion kaj helpis al la multpromesa junulo veni al Leningrado, kie en 1949 Rytchëu komencis studi en la literatura fakultato, ĝis 1954. En la sama jaro li estis akceptita de la Unuiĝo de verkistoj de USSR. En tiu periodo li sukcesis aperigi siajn rakontojn en la ĵurnaloj ‚Ogonjok‘, ‚Molodoj mir‘, ‚Dal’nyj‘ vostok, ‚Smena‘ ktp. Entreprenante aktivan tradukan laboron, Rytchëu tradukis tradukis verkojn de Puŝkin, Tolstoj, Gor’kij kaj aliaj rusaj klasikuloj al la ĉukĉa lingvo. Baldaŭ lia nomo fariĝis konata ne nur inter sovetiaj, sed ankaŭ ĉe eksterlandaj legantoj. En 1953 aperis lia unua tekstaro sub la titolo *Homoj de nia bordo. Ĉukĉa Sagao* nomiĝis lia unua romano en 1956, kaj multnombraj aliaj verkoj sekvis ĝis la fino de la 80aj jaroj. Post la fino de la universitataj studoj Rytchëu vivis kelkajn jarojn en Magadano, kie li laboris kiel korespondanto de la gazeto ‚Magadanskaja Pravda‘. Poste li translokiĝis al Leningrado, kie li pasigis preskaŭ la tutan vivon. En 1967 li aliĝis al la Komunista partio de Sovetunio. Ĉar li scipovis la anglan lingvon, li lekciadis en usonaj universitatoj kaj laboris en Unesko.

Siajn plej unuajn verkprovaĵojn Rytchëu donis en la ĉukĉa lingvo, kiu ricevis sian alfabeton nur en la sovetia tempo, sed baldaŭ li transiris al la rusa lingvo. Dostoevskij, Tolstoj, Ĉeĥov kaj antaŭ ĉio Maksim Gorkij servis kiel liaj modeloj. Por esti subtenata de la ŝtato, necesis apliki la ĝenron de la socialisma realismo en arto kaj obei la sovetian patriotismon en politiko kaj socio. Sed ŝajnas, ke Rytchëu emancipiĝis de sia interna cenzuro iom post iom, kiel li foje konfesis. Kredante je la civiliza progreso, tamen sen glori aŭ kondamni la vivon de la propra popolo, li celis montri, ke ankaŭ la ĉukĉoj estas ‚nur‘ normalaj homoj, kun ĉiaj plusoj kaj minusoj, kiel aliaj popoloj.

En la sesdekaj jaroj la beletraj figuroj de Rytchëu fariĝis psikologie pli komplikaj, pli nuancoriĉaj. Kvankam ankaŭ la kondamno de la usona imperiismo povis aŭ devis esti temo, en *Sonĝo de Polusa Nebulo* Rytchëu priskribas la sorton de kanadano, kiu hazarde trafis al Ĉukĉio, kie li edziĝis al surlokanino kaj komencis la normalan vivon de indiĝena ĉasisto. En la verko *Kiam la balenoj foriras* (1975) Rytchëu rakontas la ĉukĉan miton laŭ kiu la homo originas de la prapatrino Naŭ kaj de la baleno Rëu, kiu pro sia amo al Naŭ fariĝas homo. La kunpuŝiĝon de la kulturoj Rytchëu traktis en la libro *Polusa Fajro* (1973).

Kvankam Rytchëu ne rifuzis la sovetian prietnan politikon en si mem, en la libro *Unna* (2005) li traktas la problemon de karierismo kaj alkoholismo, trafantaj homojn de lia popolo. Kaj en *Spegulo de la Forgeso*, la aŭtoro prilaboras sian propran vivon kiel ĉukĉa studento kaj ties krizoj. La stalinisman

teroron Rytchëu ne povis pritemi en la sovetia tempo, kvankam tia intenco ekzistis. Aliaj libroj nomiĝas *La Plejlasta Ŝamano*, *La Luna Hundo* kaj *Oro de la Tundro*.

Kiam en la 80aj jaroj en Sovetunio ŝanĝiĝis la ideologia, politika kaj socia konstelacio, ankaŭ la verkaro de Rytchëu ricevis alian tonon. La kontraŭdiroj inter tradicio kaj moderna povis esti pli forte emfazataj. Unue la komunismo, poste la kapitalismo minacis la ekzistadon de la ĉukĉa kulturo. La ŝamano, antaŭe komdamnita kiel usona fiulo, ricevis pozitivan signifon kaj la sovetia civilizo demandosignon. Ĉi tiuj mallaŭtaj duboj evoluis poste al forta protesto kaj kritiko kontraŭ la traktado de la indiĝenaj popoloj, kiun Rytchëu ne hezitis nomi ‚trankvila genocido‘.

Post la disfalo de Sovetunio la verkojn de Rytchëu en Rusio kaj la novaj sendependaj respublikoj oni dume ne plu presis, tiel ke la verkisto eĉ pensis pri elmigrado al Usono. Sed kiam tra Ĉingiz Ajtmatov Rytchëu konatiĝis kun iu germana eldonisto, li sukcesis subskribi kontrakton por aperigo de siaj verkoj en la germana lingvo. Kaj kiam ekde la jaro 2000 Roman Abramoviĉ, la famekonata guberniestro de Ĉukĉio, elpaŝis kiel sponsoro, la verkoj de Rytchëu povis reapari en malgranda eldonkvanto, sed estas malfacile akireblaj. Al Rytchëu estis aljuĝitaj diversaj premioj el Ruslando, Italio, Francio.

Rytchëu estis la sola reprezentanto de la literaturoj de la indiĝenaj popoloj en la Ruslanda Nordo, kiu sukcesis fariĝi konata ankaŭ internacie, dum aliaj indiĝenaj verkistoj (kiel Ĉuner Taksami, Vladimir Sangi, Jeremej Aipin kaj Juvan Ŝestalo) forgesiĝis. Ĉi-rilate eble la nur la ĉuvaŝo Gennadij Ajgi kompareblas. La romanoj de Rytchëu estis tradukitaj en plurajn lingvojn kaj parte ankaŭ transformitaj al filmoj. La germanaj tradukoj aperis en Unionsverlag en Zuriko. Tial la aŭtoro havis ankaŭ bonajn rilatojn kun Svislando, kie li restadis plurfoje por prezenti sin kaj siajn librojn.

Kiam lia avo, la fama ŝamano Mletkin, donis al Jurij Rytchëu ties nomon, kiu signifas la nekonatan, li ne povis antaŭvidi, ke la nepo iam fariĝos internacia konata ĉukĉa verkisto kiu per sia originala verko donos identecon al la ĉukĉoj kaj metos literaturan monumenton por sia suferinta popolo. Kiam ĉukĉo mortas, li forflugas tra la nuboj, oni diras.

Ĉingiz Ajtmatov (kirgiz. Чыңгыз Айтматов, ruse Чингиз Торекулович Айтматов) 1928-2008

Ajtmatov naskiĝis en la vilaĝo Ŝeker (distrikto Talas) en norda Kirgizio proksime de la limo al Uzbekio. Tie lia patro Torekul estis respektata oficisto en administracio, lia patrino Nagima Ĥasievna, tatarino laŭ etna deveno, laboris kiel teatra aktorino. En sia infanaĝo Ajtmatov nomadis kun sia familio kaj la akompana bestaro kiel kutime ĉe la tiamaj kirgizoj. Dum la stalinismaj purigoj en 1937 lia patro estis kondamnita al mortpuno pro ‚burĝa naciismo‘ kaj ekzekutita en 1938. Sian aktivan laboran vivon Ajtmatov komencis en la aĝo de 14 jaroj, kiel helpanto de la sekretario de la vilaĝa soveto. Sekvis aktivumoj kiel impostisto, laboristo kaj maŝin-asistanto. Kiam Kirgizio formiĝis kiel respubliko de USSR, Ajtmatov ricevis la okazon trapasi lernejon en Ŝeker kaj daŭrigi sian studadon kiel veterinara medicinisto, unue en altlernejo de Djambul, 1948-53 ĉe la Kirgiza Agrikultura Instituto en la respublika ĉefurbo Frunze (nun Biŝkeko). Krome li laboris en la Scienca Esplorinstituto de la kirgiza SSR.

Sian literaturan engaĝiĝon Ajtmatov komencis en 1951/52 per tradukoj de kirgiza prozo al la rusa lingvo. En 1956 li komencis superajn literaturajn kursojn en la Literatura Instituto ‚Maksim Gorkij‘ en Moskvo, kiun li finis du jarojn poste. La postan jaron li estis akceptita kiel membro de la sovetia Verkista Asocio. Sekve li laboris ok jarojn por la partia gazeto ‚Pravda‘. En tiu periodo li sukcesis publikigi verkaĵojn en la gravaj ĵurnaloj ‚Novy Mir‘ kaj ‚Oktjabr‘.

Kiel deputito de la Supera Soveto de USSR kaj kiel membro de la CK de la Komunista Partio de Kirgizio Ajtmatov engitis la politikon (al la KP de SU li aliĝis en 1959). Krome li funkciis kiel membro de la sekretariejo de la Verkista Unio kaj de la Kinematografia Unio. Ankaŭ li aliĝis al la prezidio de la Sovetia Komitato por Solidareco kun la ŝtatoj de Azio kaj Afriko. Li estis ĉefredaktoro de la gazeto ‚Eksterlanda Literaturo‘ kaj iniciatinto de la internacia intelektula movado ‚Issyk-Kul-Forumo‘. En 1988-90 Ajtmatov prezidis la kirgizan aŭtoran asocion. En la tempo de perestrojko li estis aktiva kiel parlamenta deputito en la Supera Soveto de USSR. Gorbaĉov vokis lin en ties

prezidian konsilion kiel konsilanton pri kultur(politik)aj demandoj. Surbaze de tiuj funkcioj oni ripete riproĉis al Ajtmatov, ke malgraŭ reĝimkritikaj tendencoj li estis tro proksima al la sovetia reĝimo kaj povis ĝui ties privilegiojn. En novembro 1990 li perdis siajn funkciojn en la verkista asocio kaj en la prezidia konsilio kiam li enposteniĝis kiel ambasadoro de USSR en Luksemburgo. En 1994 Boris Jelcyn pensiigis lin kiel diplomaton. Sed samjare li estis elektita kiel rekta deputita al la parlamento de Kirgizio kaj nomumita kiel ambasadoro de Kirgizio en la beneluksaj ŝtatoj kaj ĉe Eŭropa Unio. Krome li deĵoris kiel konstanta delegito ĉe Unesko.

La specifaĵo de la verkaro de Ajtmatov estas, ke en liaj rakontoj gravegan rolon ludas la kirgizaj tradicio kaj kulturo. La kontraston inter la pezaj kondiĉoj de la vivo por la kirgizoj kaj la kolhoza ĉiutago la aŭtoro priskribas senteme, poezie kaj rakonte. En siaj pli novaj verkoj Ajtmatov kritikis la detruadon de la naturo kaŭzata pro la ignorado fare de la homoj. La plej fama rakonto de Ajtmatov, *Dfamilja*, estas ĉarma amrakonto el Kirgizio de la somera militjaro 1943. Iuj kiel la franca surrealisto Louis Aragon konsideras tiun tekston, publikigitan en 1958, kiu ricevis kiel aliaj rakontoj de Ajtmatov ankaŭ filman formon, kiel la plej belan amrakonton de la mondo. En la lernejoj de la orienta bloko ĝi estis eĉ deviga legaĵo. Aliaj konataj rakontoj de Ajtmatov nomiĝas *Adiaŭo de Ĝilsary* (1967), *La blanka vaporŝipo* (1970), *Fruaj grupoj* (1975), *La sonĝoj de la lupino* (1996). Ajtmatov verkis ankaŭ romanojn (ekz. *La Neĝleopardo*, kaj dramojn.

En la 70aj jaroj lia stilo pli kaj pli forlasis la socialisman realismon, kiu antaŭe estis deviga por la sovetiaj verkistoj. En 1987 li estis festata kaj honorata gasto en la Frankfurta Librofiro. En la tempo de perestrojko la ajtmatova arto ankoraŭfoje kulminis per la romano *La Eŝafodo* (1987).

Pro sia estiminda laboro Ajtmatov ricevis kelkajn ordenojn kiel tiun de la heroo de la socialisma laboro (1978), dufoje la Lenin-ordenon, la ordenon de la Oktobra revolucio, tiun de la amikeco inter la popoloj k.a., poste ankaŭ la ordenon de la heroo de la Kirgiza respubliko (1997), la ruslandan ordenon de la amikeco (1998). Inter la premioj aljuĝitaj menciindas la Lenin-premio (1963) kaj la ŝtata premio de Sovetunio (1968, 1977, 1983), la ŝtata premio de la Kirgiza Respubliko (1976) kaj deko da aliaj premioj diverslandaj.

Kiel ĉe Rytchëu, la zurika Unions-eldonejo publikigis ankaŭ la verkojn de Ajtmatov, kiu skribis ĉefe ruslingve, kaj invitis lin prelegi en Svislando. Ambaŭ parolis ruse okaze de siaj publikaj elpaŝoj kaj devis esti tradukitaj. Okaze de tiaj prezentoj mi havis la okazon persone konatiĝi kun la du aŭtoroj.

Post diagnozo de diabeto malsano Ajtmatov forpasis la 20an de junio 2008 en la nurenberga kliniko post trisemajna artefarita komato sekve al grava pneŭmonito kun aldona misfunkcio de la reno. En ŝtata ceremonio ĉirkaŭ dudek mil personoj adiaŭis la mortintan famkonatan verkiston en Biŝkeko, ĉefurbo de Kirgizio, kie laŭ islama tradicio la mortinto ricevis tombon en la memorejo Ata Bejijt, apud sia patro.

Maljuniĝante, Ajtmatov, sentis, ke la „sovetia homo“, kaj kiel tia li mem evidente komprenis sin ĝis la fino, fariĝis anakronismo. Ĉe Rytchëu verŝajne estis same. Tamen, ŝajnas, ke ambaŭ sovetiaj verkistoj trafis per siaj libroj la guston ankaŭ de la okcidenta publiko, kiu ŝatas la etoson de malproksimaj ekzotaj landoj kaj la filozofiajn meditojn de orientaj verkistoj.

Aleksandr Isaeviĉ Solĵenicyn (ruse Александр Исаевич Солженицын) 1918-2008

Post la bedaŭrinda forpaso de Rytchëu kaj Ajtmatov sekvis ankoraŭ, la 3an de aŭgusto, noktomeze, la mesaĝo pri la morto de Aleksandro Solĵenicyn. Post la sekreta parolado de N.S. Ĥruŝĉov kadre la XX. Konferenco de la Komunista Partio de Sovetunio de la jaro 1956, en kiu la sovetia ŝtatestro senmaskigis la personkulton kaj la malhomecan sistemon, kreitan de Stalino kaj de liaj abomenaj lakeoj, Solĵenicyn apartenis al la unuaj kaj plej fortaj literaturistoj, kiuj kuraĝis kritiki la stalinistan mondon de persekutoj, denuncoj, arestoj, humiligoj, neniigoj, mortigoj. Lia ĉefverko *Arkipelago GULago* (1974), kiu dum la Malvarma Milito devige troviĝis en la biblioteko de ĉiu serioza intelektulo, skuis la mondon kaj faris la stalinan inferon surteran pli komprenebla. La verko estas dediĉita „al ĉiuj tiuj, kiuj ne havis sufiĉan vivon por mem rakonti“, laŭ Solĵenicyn temis pri sia „provo de arta prilaborado“ de la gulaga sistemo. Wolfgang Kasack, la germana ĉeffakulo pri rusa literaturo, konsideris Solĵenicyn kiel la „verŝajne plej signifan proziston de la rusa literaturo de la 20a jarcento“.

Junajo, profesia kariero

Aleksandr Isaeviĉ Solĵenicyn naskiĝis la 11an de decembro 1918 en la sudrusia urbo Kislovodsko. Lia patro Isakij Semjonoviĉ, devena el norda Kaŭkazo, estis rusortodoksa kredanto, kiu ne povis finstudi filologion en la moskva universitato, ĉar li devis militservi ĉe la germana fronto. Li tragike pereis kiel oficiro fine de la unua mondmilito en junio 1918 ĵus antaŭ la naskiĝo de la filo, kiu estis edukita de la patrino Taisija Zaharovna Ŝĉerbak, tajpistino, filino de ukraina bienulo. La familio de la patrino fariĝis viktimo de la bolŝevista konfiskteroro.

En 1924 Solĵenicyn translokiĝis kun sia patrino al Rostovo ĉe Dono, kie 1926-36 li vizitis la lernejon, vivante rande de la materia mizero. La lernejo trudis al li la komunisman ideologion, kaj en 1936 li aliĝis al la Komsomolo. Ĝuste en tiu periodo vekigis en li la emo verki beletre. Kiel Solĵenicyn konfesis en sia aŭtobiografio, li volis esti verkisto, sed li ne povis trovi okazon por publikigi siajn manuskriptojn. Krom tio, en Rostovo ne ekzistis la ebleco por ricevi laŭdeziran literaturan edukadon, kaj la cirkonstancoj malpermesis al li translokiĝi al Moskvo. Evitante, ke literaturo fariĝu lia sola ĉefokupo, li enskribis sin en la Departemento pri fiziko kaj matematiko de la rostova universitato, kiun li finis en 1941 kun distingo. Sed malgraŭ lia videbla matematika talento Solĵenicyn ne volis dediĉi sian vivon nur al tiu profesia fako. Kiel montros lia posta sorto, matematiko savis lian vivon kaj helpis, por ke li povu verki. Por flegadi siajn literaturajn kaj historiajn interesojn, en 1939 li ekstudis perkoresponde en la Instituto pri historio, filozofio kaj literaturo de Moskvo.

Milito kaj ekzilo

En 1941 Solĵenicyn fariĝis, kun prokrasto, ruĝarmeano de la Granda Patrolanda Milito, kaj komence servis kiel veturisto de ĉevalĉaroj. Pro siaj matematikaj konoj, en aprilo 1942 li estis sendita al la artileria lernejo en Kostroma, tuj poste li forveturis al Saransko, kie atendis lin novaj militaj taskoj. Intertempe li estis leŭtenanto. Ekde februaro 1943 li deĵoris en la batalanta armeo kadre de la dua belorusa fronto kaj tiel atingis kun sia taĉmento Orientan Prusujon. En junio 1944 li estis nomumita kapitano. Dum la milito Solĵenicyn abunde verkadis kaj skribis taglibrojn (vd. la poemon *Doroĵenka* kaj la librojn *Orientprusaj Noktoj*, *Prusskie noĉi* 1976, kaj *Schwenkitten* '45).

En februaro 1945 Solĵenicyn estis arestita. La milita cenzuro trovis leterkorespondaĵojn kun sia malnova lerneja amiko Nikolaj Vitkeviĉ, en kiuj Solĵenicyn kritikis la misformadon de la leninismo far Stalino kaj skribis malrespektajn frazojn pri la sovetia gvidanto. La arestito estis transportita al Moskvo kaj tie kondamnita al okjara laborpuno en la gulago (kio estis milda puno en tiu tempo, kiel Solĵenicyn rimarkigis). Sekve Solĵenicyn trapasis diverstipajn prizonojn kaj koncentrejojn (ĉi tiun sperton li prilaboris en unu teatraĵo). En aŭgusto oni enkarcerigis lin en Nova Jeruzalemo, en septembro en la koncentrejo (kampadejo, lagro) ‚Kalugaj Pordegoj‘. En junio 1946 li estis translokita al speciala prizono de MVD-MOB (Ministerioj pri internaj aferoj kaj pri Ŝtata Sekureco), kaj en septembro lin ekvidis la speciala prizono por fakuloj-sciencistoj (Ŝaraŝka) en la aviadila fabriko de Rybinsko. La itinero tra la gulagaj karceroj estis daŭrigita: kelkajn monatojn poste Solĵenicyn estis translokita al Zagorsko, kaj en julio 1947 li enprizoniĝis en Marfino apud Moskvo, kie li ‚laboris‘ kiel matematikisto. Ĉi tie li ankaŭ konatiĝis kun alia disidento – Lev Kopelev, kaj komencis prilabori sian *Amu la revolucion (Ljubi revolucion)*. La restadon en Marfino Solĵenicyn priskribis en la romano *En la unua cirklo*. En decembro 1948 okazis la divorco inter Solĵenicyn kaj ties edzino Natalja Reŝetovskaja. En 1950 Solĵenicyn trapasis novan etapon en specialaj prizonoj por politikaj arestitoj tra Butyrka (kie estis retenitaj en la sovetia periodo interalie ankaŭ Babel, Dzerĵinskij, E. Ginzburg, Majakovskij), por alveni, en aŭgusto, ĉe la fina celo de sia ‚vojaĝo‘ tra la gulago: en ‚steplag‘ (stepa koncentrejo) en Ekibastuzo, Pavlodara distrikto de Kazaha SSR. Tie li devis labori kiel ministro, masonisto kaj gisisto. Post kiam Solĵenicyn malsaniĝis je kancero, li estis liberigita la 13an de februaro 1953. Unu monato post sia liberiĝo el la gulago la tre suferinta viktimo ricevis rezolucion de OSO (speciala komitato de NKVD) kun la sciigo, ke li estas ekzilita dumvive al la vilaĝo Berlik en la Kok-Tereka rajono* de la Djambula distrikto de suda Kazahstano. Kiel Solĵenicyn klarigis en sia aŭtobiografio, ĉi tiu paŝo ne estis unuavice direktita kontraŭ Solĵenicyn kiel persono mem, sed signifis kutimon en tiu tempo por trakti la eksgulaganojn. Tie ekde marto 1953 (la 5a estas la dato kiam la morto de Stalino estis anoncita publike) Solĵenicyn ‚servis la ekzilon‘ (kiel tekstas la angla traduko: I

served this exile), ĝis junio 1956, elturniĝante kiel vilaĝa instruisto pri matematiko kaj fiziko por la 8-10aj klasoj de la meza lernejo je la nomo ‚Kirov‘. Ĉar lia kancera malsano pliakriĝis je la fino de 1953, li estis operaciita en taŝkenta malsanulejo. Li fartis tiam tre malbone: ‚Mi estis proksime de la morto, ne povis manĝi, nek dormi, kaj estis severe afekciita pro la veneno de la tumoro‘. Tamen dum kuracado Solĵenicyn povis esti savita. Ĉi tiun unikan sperton li prilaboris en la aŭtobiografieca romano *Kancerkliniko (Rakovy korpus)*, elpensita en printempo 1955. En la ekzilo, kie li sentis malfacilan kaj solecan ekzistadon, li verkadis sekrete prozon. Do estiĝis krom la manuskripto pro la teatraĵo *Respubliko de la Laboro (Respublika truda)* lia elstara romano *En la unua cirklo (V krughe pervom)*. En junio 1956 sekvis lia liberigo ‚sen rehabilitado‘ pro modela konduto (t.e. manko de krimaj agadoj laŭ la ĵargono de la Supera Tribunalo de USSR). En aŭgusto Solĵenicyn revenis al centra Rusio, kie li unue ekloĝis en la vilaĝo Mylcevo, Kurlova rajono de la Vladimira distrikto, kie li ree instruis matematikon. Tie li ankaŭ renkontiĝis denove kun sia iama edzino Natalja Reŝetovskaja, kiu definitive re-aliĝis al li en novembro 1956, pere de duafoja geedziĝo la 2an de februaro 1957. Laŭ decido de la Milita Kolegio de la Supera Tribunalo de USSR, Solĵenicyn estis rehabilitita la 6an de februaro 1957. Ekde julio Solĵenicyn vivis en Rjazano, laborante kiel instruisto pri astronomio en meza lernejo. Dediĉante sin al verkado, Solĵenicyn ofte retiriĝis al solecaj lokoj por povi labori sen esti ĝenata.

Nova danĝera danco kun la reĝimo

Dum sia longa aresta periodo Solĵenicyn komplete seniluziiĝis pri marksismo-leninismo, ekkredis je Dio kaj ekadoris ortodoksajn-patriotismajn ideojn. En tio trovis lokon ankaŭ lia ideo pri slava ŝtato sur la teritorio de Ruslando, Belorusio kaj Ukrainio, kies reĝimo devus esti aŭtoritativa, tamen kun iom-post-ioma transiro al la demokratio. La gvida forto devus esti la rusoj, kiuj edukus la popolon laŭ tradicie spirita, moralaj kaj religiaj principoj.

Nun komenciĝis por Solĵenicyn nova vivetapo kun novaj perspektivoj, defioj kaj problemoj.

Inter la unuaj tekstoj, preparitaj de Solĵenicyn por publikigo, apartenis la rakonto *Ŝĉ-854 (1959)* pri la vivo de simpla arestito devenanta el rusaj kamparanoj. Iam Solĵenicyn mem estis arestito ‚Ŝĉ-202‘.

Impresita pri la prelego de Aleksandro Tvardovskij, redaktoro de la elstara literatura revuo ‚Novyj Mir‘ (Nova Mondo), dum la XXII Konferenco de la Komunista Partio de USSR en 1961, Solĵenicyn havigis al li tiun rakonton *Ŝĉ-854*, el kiu li tamen forigis la plej tiklajn politikajn erojn, por ne provoki la cenzuron. Tvardovski alte aprezis tiun tekston kaj invitis ĝian aŭtoron al Moskvo. Kun la beno de Ĥruŝĉov la teksto povis esti publikigita kaj aperis sub la titolo *Unu Tago en la vivo de Ivan Denisoviĉ (Odin den' Borisa Denisoviĉa)* en ‚Novyj Mir‘, n-ro 11/1962. Ĉi tiu rakonto, kies enhavo referencis al la spertoj en la kazaĥa gulago de Ekibastuzo, estis tuj reeldonita aliloke kaj tradukita en fremdlingvojn. Kaj la 30an de decembro Solĵenicyn estis akceptita en la sino de la Verkista Asocio de USSR. Baldaŭ post tiu sukceso, ‚Novyj Mir‘ publikigis aliajn tekstojn de Solĵenicyn kiel *La korto de Matrjona (Matrjonin dvor, 1963)* k.a. Ĉi tiuj publikigoj kaŭzis grandan eĥon flanke de verkistoj, sociaj agantoj, legantoj, iamaj arestitoj ktp. Eĉ la poetino Anna Aĥmatova miris pri la kuraĝaj verkaĵoj de Solĵenicyn. Kiam en decembro 1963 la revuo ‚Novyj Mir‘ kaj la Centra Ŝtata Arkivo de literaturo kaj arto proponis la rakonton *Unu Tago en la vivo de Ivan Denisoviĉ* por aljuĝo de la Lenina Premio en 1964, la Komitato pri premioj tamen rifuzis la proponon. Renkontante Varlamon Ŝalamov, alian gravan prigulagan verkiston, kiu apreze pritaksis *Ivan Denisoviĉ*, Tvardovskij, ankaŭ interesiĝante pri la *Kancerkliniko*, proponis, ke ambaŭ kune ellaboru la *Arkipelagon*. En aŭtuno unu el la teatraĵoj de Solĵenicyn estis permesita por prezentado en la Lenin-Komsomola Teatro en Moskvo, kaj unu peco povis aperi ankaŭ en ‚Literaturnaja Gazeta‘.

Post Ĥruŝĉov

La 14an de oktobro 1964 Nikita Ĥruŝĉov estis forpuĉita laŭ iniciato de Suslov, Breĵnev, Kossygin, Mikojan kaj kompanio. Tio signifis, ke Solĵenicyn perdis pli kaj pli la eblecon laŭleĝe aperi siajn verkojn kaj publike elpaŝi. Pluraj signifaj ĵurnaloj kiel ‚Ogonjok‘, ‚Oktjabr‘, ‚Literaturnaja Rossija‘, ‚Moskva‘, ‚Pravda‘ k.a., kiuj ricevis la proponon publikigi tekstojn de Solĵenicyn, rifuzis aperi ion ajn de li.

En septembro 1965 la sekreta servo (KŜS) traserĉis la loĝejon de V.L. Teuŝ, ĉe kiu Solĵenicyn konservis parton de siaj arkivaĵoj. Dum estis konfiskita lia arkivo, la CK KPSU mem distribuis en nepublika eldonkvanto aron da verkaĵoj de Solĵenicyn inter la anoj de la nomenklaturato. Solĵenicyn reagis per plendoj persone al Breĵnev, Suslov, Andropov kaj per tio altigis la atenton pri si mem. Samtempe Solĵenicyn komencis memstare elpaŝi en Sovetunio, ekzemple pere de intervjuoj kun eksterlandaj ĵurnalistoj. Pluraj rifuzitaj tekstoj de Solĵenicyn migris ekde 1964 al la samizdato (sistemo de nepermesita memeldonado) kaj tiel trafis ankaŭ al okcidento, interalie Germanio, Francio kaj Usono, kie ili estis publikigitaj. Lia letero de 1967 al la delegitoj de la 4a kongreso de la Verkista Asocio de USSR, en kiu li postulis la abolon de la cenzuro, vaste diskonigis la verkiston inter la inteligenciuloj de Sovetunio kaj en eksterlando. Post tiu Letero la sovetiaj instancoj komencis definitive serioze okupiĝi pri la ĝena protestanto. En 1968, kiam en Usono kaj Okcidenta Eŭropo estis publikigitaj liaj romanoj *En la unua cirklo* kaj *Kancerkliniko*, kio alportis al la verkisto grandan popularecon, la sovetia gazetaro lanĉis propagandan kampanjon kontraŭ la problemaŭtoro. Ĉio tio koincidis, rememore kaj kiel konate, ankaŭ kun la Praga Printempo. La ludo inter Okcidento kaj Sovetunio estis daŭrigita per la armilo de la Nobelpremio pri literaturo. Kiam en 1969 Solĵenicyn estis proponita por tiu premio, li ankoraŭ ne ricevis ĝin, kaj en novembro de la sama jaro li estis eksigita el la Verkista Asocio de USSR. En 1970 la nomumo kiel premiito de la literatura nobelpremio sukcesis – granda ŝoko por la sovetiaj instancoj. Post tio la sovetia gazetaro relanĉis fortan propagandan kampanjon kontraŭ Solĵenicyn kaj alvokis lin forlasi la landon, kion li rifuzis. La nobelpremio pri literaturo, aljuĝita en 1970 al Solĵenicyn *in absentia*, ne povis esti akceptita de la verkisto persone, pro la timo, ke li ne povus reveni al Sovetunio post la transpreno de la premio.

En tiu periodo (1968) Solĵenicyn konatiĝis kun Natalja Svetlova. Baraktinte kontraŭ malfaciloj divorci de la unua edzino, la 22an de julio 1972 li finfine sukcesis registri sian geedziĝon kun la nova virino, kio havigis al li la rajton oficiale ekloĝi en Moskvo. Samtempe li povis aperigi sian romanon *Aŭgusto 14* en Parizo, en kiu estis esprimitaj liaj ortodoks-patriotaj konsideroj. En 1972 li verkis leteron al patriarko Pimen, en kiu li komentis la problemojn de la eklezio. 1972-73 li prilaboris sian epopeon *La ruĝa rado* (*Krasnoe koleso*), sen gvidi aktivan disidentan agadon. Tamen, la 23an de aŭgusto li donis intervjuon al eksterlandaj korespondantoj. Samtage KŜS kaptis sinjorinon Elisaveta Voronjanskaja, unu el la helpantinoj de la verkisto, kiu transdonis, dum pridemandado, ekzempleron de *Arkipelago GULago*. Poste ŝi iris hejmen kaj mortpendigis ŝin. Pri tiu malfeliĉo la verkisto eksciis nur la 5an de septembro. Por la publikigo de la verko de *Arkipelago GULago*, la teksto devis esti kontrabandita mikrofille tra la kanalo de samizdato (ne: samizdato) al eksterlando, kie ĝi estis presita kaj eldonita ĉe YMCA-Press en Parizo. Per *Arkipelago GULago* Solĵenicyn kreis tute novan literaturan ĝenron, nome tiun de la gulaga literaturo, kiu estas karakterizita de kompleksa retoriko, emfazanta, analizanta kaj akuzanta la profundan malrespekton de la homa digno. Ĉi tiun specifan kriminalistikan arton, kombinitan kun psikologia observokapablo (Ulrich Schmid, NZZ), Solĵenicyn evoluigis ankaŭ en aliaj romanoj kiel la menciitaj *En la unua cirklo* (aŭ *rondumo*) kaj *Kancerkliniko*, kie li okupiĝis pri la tipaj sovetiaj problemoj de koruptado, mensogo, timo, puno ktp.

Lige kun tiu evoluo Solĵenicyn skribis leteron al la gvidantoj de Sovetunio por oficiale distanciĝi de la komunisma ideologio kaj pledi en la direkto de starigo de rusa nacia ŝtato. En la okcidenta gazetaro aperadis amaso da artikoloj defende al Solĵenicyn kaj aliaj disidentoj en Sovetunio, kie samtempe sekvis vasta kampanjo kontraŭ Solĵenicyn kaj la disidentoj. Kiel lastan kompromison KŜS proponis, tra la eksedzino de Solĵenicyn, ke estu oficiale publikigita *Kancerkliniko*, se Solĵenicyn rezignas pri la publikigo de *Arkipelago GULago* en eksterlando.

Elpelo kaj emigracio

Intertempe la pacienco de Breĵnev, Kosygin, Podgorny, Andropov kaj aliaj anoj de la CK de KPSU elĉerpiĝis, kaj la „kazo Solĵenicyn” diskutiĝis en la politburoo kaj la CK de KPSU, kie oni prijuĝis la verkiston *persona non grata* kaj pledis por la elpelo de Solĵenicyn eksterlanden. La 12an de februaro 1974, laŭ dekreto de la Prezidio de la Supera Soveto de USSR, la verkisto estis arestita kaj kulpigita pro perfido de la patrujo. Kiel cellandoj estis menciitaj Irako aŭ Danlando, sed Willy Brandt ofertis akcepti la nedeziratan personon en Germanio, kaj tiel la forpelito, kiu ankaŭ perdis sian sovetian civitanecon, flugis kun sia familio al Frankfurto la 29an de marto.

Kompreneble la libro *Arkipelago GULago* signifis mondan sensaciegon, kaj ĝi funde kaj baze modifis la bildon, kiun multaj okcidentaj intelektuloj havis pri Sovetunio, akcelante la personan ideologian krizon ĉe tiuj, kiuj sincere aŭ naive kredis la superecon de la marksismo-leninismo. Iuj idealistoj hodiaŭ eĉ asertas, ke la trilogio *Arkipelago GULago* esence kontribuis al la detruo de la sovetia komunismo kaj al la fino de Sovetunio mem. Tie la verkoj de Solĵenicyn estis malpermesitaj kaj cirkulis kadre de samizdato dum jardekoj. Maksimune la rakonton *La korto de Matrjona (Matrjonin dvor)*, verkitan en 1959 kaj aperintan en 1963, la sovetianoj rajtis legi. Pere de la honorarioj enkasigitaj per *Arkipelago GULago* estis starigita Socia Fondaĵo por helpi al persekutitoj kaj ties familioj.

Post la perforta ellandigo de Solĵenicyn la ekzilito trovis unue ŝirmon en Germanio ĉe Heinrich Böll. En februaro 1975 Solĵenicyn atingis Zurikon, kie la interesiĝo pri lia persono estis grandega. En marto lia familio postsekvis lin al Svislando, kie oni sentis sin honorita, ke la „konscienco de Ruslando“, kiel la disidentoj estis kaŝnoma en sia patrujo, decidis ekloĝi en la bela alpa respubliko. Fakte la ekzilito eĉ esprimis sian intencon resti en Svislando „por longa tempo“, ĉar la svisa speco de demokratio plaĉis al li. Iam li eĉ vizitis la prademokratian baloto-institucion de ‚Landsgemeinde‘ en Appenzell, kiun la sovetia verkisto agnoskis per vigla simpatio. Kompreneble en Svislando, kiu firme aplikis kontraŭkomunisman sintenon kaj kiel neŭtralulo staris flanke de okcidento dum la malvarma milito, la publika scivolemo pri la sorto de Solĵenicyn estis granda. Precipe ĵurnalistoj ‚perskutadis‘ lin, la faman loĝanton de la domo Stapferstrasse 45 en Zuriko. Tiu konstanta publika atento, komplikajoj kun la loka polico kaj la timo antaŭ sovetiaj agentoj ne plaĉis al Solĵenicyn. En aprilo 1975 la verkisto vojaĝis tra okcidenta Eŭropo kaj vizitis Kanadon kaj Usonon, kie li elpaŝis en la Kongreso. En siaj paroladoj la ruso akre kritikis la komunistajn reĝimon kaj ideologion kaj alvokis Usonon rezigni pri sia kunlaboro kun Sovetunio. Dum lia vojaĝo tra Britio kaj Francio en februaro 1976 estis konstataj klare ankaŭ liaj kontraŭokcidentaj vidpunktoj. Ŝajnas, ke en Hispanio (marto 1976) li laŭdis la reĝimon de Franco, admonante la hispanojn, ke ili ne tro rapide alproksimiĝu al la demokratio. Ke li renkontis en Ĉilio la diktatoron Pinoĉet en Ĉilio, la verkisto neis en la aŭtobiografio *Inter la muelŝtonoj*.

En Usono

En aprilo 1976 la familio Solĵenicyn forvojaĝis al Usono. En Cavendish, ŝtato Vermont, Solĵenicyn serĉis kaj ŝajne trovis dume sian trankvilecon. Por ŝirmi lin kontraŭ ĝenoj kaj danĝeroj, la lokaj loĝantoj protektis la domon de la fuĝinto, kaj en vendejoj oni rifuzis doni informojn pri kiel trovi la vojon al lia domo. Barilo ĉirkaŭis ĝin, por ke la verkisto povu vivi kaj labori senĝene. Ĉar li ĉiam kredis, ke li iam reheimiĝos al Ruslando, Solĵenicyn ne klopodis lerni la anglan lingvon kaj ankaŭ ne pensis pri integriĝo en la usona ĉirkaŭaĵo. En la usona elmigrado (emigracio) estiĝis lia dekvoluma epopea ciklo *La Ruĝa Rado (Krasnoe koleso)*, kiu enhavas epizodojn de la ruslanda historio inter 1914 kaj 1917, interalie la revolucion de tiu ĉi jaro. En 1983 estis aljuĝita al li la Templeton-premio (kun valoro de 820 000 pundoj sterlingaj), kiun ricevas personoj, kiuj plibonigas la rilatojn inter scienco kaj religio. Kvazaŭ izolita kaj sen deziro akcepti ĵurnalistojn kaj scivolemajn vizitantojn, en Usono Solĵenicyn observadis la evoluon en la mondo, precipe en sia patrujo Sovetunio. Inter la malmultaj akceptitoj troviĝis Rudolf Augstein, la fondinto de la germana revuo ‚Spiegel‘.

Reveno al Ruslando

Nur en 1989, do en la tempo de perestrojko kaj glasnosto, la verkoj de Solĵenicyn trovis okazon esti publikigitaj (en ‚Novyj Mir‘ kaj apartaj eldonaĵoj), post kiam la aŭtoro estis agnoskata kiel grava aŭtoro kaj reintegrata en la Verkista Asocio, sed ne sen viglaj kontraŭdiraj diskutoj ĉe la partia pinto. Gorbaĉov komence esprimiĝis kontraŭ la publikigo de *Arkipelago GULago* en Sovetunio, konsiderante ĝin „kontraŭsovetia verko“. Sed la fiaska ŝtatestro ne havis ŝancon: la libroj de la rehonorigito aperis en eldonkvantoj de milionoj da ekzempleroj.

Post la kolapso de la sovetia komunismo en 1990 la verkisto estis plene rehabilitita, kaj la ŝtato rehavigis al li la perditajn civitanajn rajtojn. Al lia ĉefverko *Arkipelago GULago* estis aljuĝita la Ŝtata

Premio, sed li rifuzis ĝin, ‚dankante‘ la komplezon per la publikigo de la eseeca alvoko *La vojo de Ruslando el la krizo (Kak nam obustroit‘, 1990)*, kiu aperis en eldonkvanto de 72 milionoj da ekzempleroj. En 1991 la ĝenerala prokuroro Trubin senkulpiĝis pro la ‚neleĝa proceduro fare de iamaj kunlaborantoj de la prokurorejo de USSR‘ kontraŭ Solĵenicyn, kiun li siatempe devis elteni. Pli ol 105 dosieroj la sekreta polico (KŜS) kolektadis pri li.

En 1993 Solĵenicyn vizitis okcidentan Eŭropon. Kiam en majo 1994 li definitive rehejmiĝis al sia lando, la 27an de majo, li vojaĝis dum 55 tagoj kun entute 9000 kilometroj de Vladivostoko ĝis Moskvo. Post dudekjara foresto de la patrujo li retrovis komplete ŝanĝitan landon, kaj li konfesis: ‚Mia literatura misio estas plenumita. Nun venis la tempo por kontribui al la rekonstruado kaj renaskiĝo de Ruslando‘. Sed tio, kion li trovis surloke, ne plaĉis al li, kaj li komencis senhezite kritikaĉi ĉion kaj ĉiun: Al Gorbaĉov li riproĉis ‚politikan naivecon‘, Jelcyn laŭ li ‚disponigis la riĉaĵojn de Ruslando por la senhezita rabado‘. En la ruslanda parlamento li eksplicite prilamentis la malordon en la lando. Lia opinio pri Putin, la eksa oficiro de KŜS, estis jam pli favora. Ĉi tiun novan nacian gvidanton, kiu falis kiel stelo de la ĉielo sur la rusan popolon kaj kiu ne hezitis solvi la problemojn en Kaŭkazo per militagresaj rimedoj kaj aliloke per gulagaj manieroj (ekzemple en la kazo Ĥodorkovskij), li laŭdis, ĉar li celus la restarigon de la ‚nacia grandeco‘ de Ruslando paŝon post paŝo, eble kun iom da ‚direktata demokratio‘, diru: pseŭdodemokratio. Rilate al la okcidento, kiu konsiderus Ruslandon kvazaŭ kiel parton de la ‚Tria Mondo‘, Solĵenicyn suspektis, ke ĝi volas kapti Ruslandon por ĝia sfero, kaj bedaŭris, ke Eŭropo kaj Ameriko ne kapablis kompreni Ruslandon. Sed ĉu li mem kapablis kompreni Eŭropon kaj Amerikon, al kiuj la pli kaj pli aroganta moralisto riproĉis ‚dekadencon‘ kaj ‚poltronecon‘ ? La memuaroj *Miaj amerikaj jaroj* postlasas unikan impreson pri la patosa idiomato de tiu komplika verkista personeco kun ĉiuj fortoj kaj malfortoj de lia nepre kontraŭdira karaktero.

Rilatoj kun aliaj disidentoj

La rilatoj de Solĵenicyn kun aliaj disidentoj estis tre malfacilaj. Atakata estis ekzemple Andrej Saĥarov (1921-89), kiu same kiel Solĵenicyn portis la nobelpremion, pro siaj ‚naivaj‘ politikaj vidpunktoj. Saĥarov admonis sian disidentan kolegon pri la fakto, ke monarkiismaj kaj naciismaj ideoj estus danĝeraj por la socio. Flanke de Lev Kopelev Solĵenicyn sentis sin kalumniata pro antisemitismo. Kaj ĉe Sinjavskij li ne ŝatis, ke li malkaŝis mankojn en la solĵenicyna verkaro. La anticipan liberiĝon de Sinjavskij el la gulago Solĵenicyn interpretis per lia kunlaborado kun KŜS. Ĉu Solĵenicyn, kiu konsterniĝis, kiam la de li ofenditaj aŭtoroj kaj biografoj klopodis jure procesi kontraŭ li, forgesis, ke male al Sinjavskij, Daniel, Pasternak, la reprezalioj trafis lin pli malfrue ol liajn same kritikajn kolegojn ? La jam menciita Varlam Ŝalamov (1907-82), alia eminenta rusa aŭtoro prigulaga, atentigis pri la risko, ke beletre pritraktante la gulagon, ĝi povus esti romantikigita. Marvin J. Chomsky, la reĝisoro de la fama serio ‚Holokaŭsto‘, ricevis la malpermeson de la majstro produkti filmon el *Arkipelago GULago*. Kaj fine ankaŭ Joseph Brodsky kaj Efim Etkind ne estis protektitaj de la blasfemo de Solĵenicyn. Kiam Saĥarov vizitis Usonon kaj serĉis la pertelefonan kontakton kun Solĵenicyn en Vermonto, dialogo ne estiĝis. Kun siaj disidentaj kolegoj li ne sukcesis kaj evidente ankaŭ ne strebis trovi komunan lingvon trans la personaj vidpunktoj. Ankaŭ kun siaj biografiantoj Solĵenicyn kverelis, ekzemple kun Michael Scammell, kiu publikigis en 1984 milpaĝan biografion pri la verkisto. Dum ĉe Solĵenicyn mem apenaŭ ekzistas adekvata ĉapito pri la tragika morto de lia plej aĝa filo Dmitrij, la verkisto pedante observadis, kio estas skribata pri li, kaj kio ne plaĉis al li, tion li rifuzis en siaj memuaroj *Miaj amerikaj jaroj*, kiuj aperis kun prokrasto.

Ĉar li ne ĉiam sentis sin sufiĉe komprenata de siaj iamaj samideanoj kaj de okcidento, Solĵenicyn evoluigis neracian vengemon supozeble nenecesan kaj grandparte sensencan. Nature oni povas kaj rajtas diskuti pri la praveco aŭ ne rilate la dekadencan de okcidento. Kiam dum sia vojaĝo tra Ruslando en 1994 Solĵenicyn konstatis nesufiĉe grandan intereson pri sia persono kaj siaj komentoj, li seniluziigite kondamnis ankoraŭ la reston de sia amata Ruslando, kiu falis laŭ li en la manojn de la aĉaj kapitalistoj. Anstataŭ legi liajn famegajn librojn kaj moralpredikojn, la popolo preferis trivialromanojn el Usono. Lia libro *La falo de Ruslando (Rossija v obvale)*, publikigita en 1998, estas emocia pamfleto pri la situacio en lando, en kiu la rusa popolo estas ĉie aĉe traktata, kiu pro la ekspluatado far la oligarkoj troviĝas rando de la nacia ruiniĝo kaj kiu stulte adoras la okcidentan

civilizon. En la kazo de Ĉeĉenio temis pri etna purigo kontraŭ la rusa popolo fare de ĉecenaj banditoj kaj teroristoj.

En la sama jaro la Rusa Akademio de Sciencoj aljuĝis al li la „Lomonosov“-ormedalon.

Kiam NATO bombadis Serbion en 1999, la advokato de la ortodoksaj slavoĵ ekscitiĝis, riproĉante al la okcidentaj potencoj, ke oni celas „detruigi grandiozan eŭropan landon“.

Solĵenicyn kredeble revis, laŭ la maniero de la historiaj slavemuloj (ruse slavjanofily), pri ia utopia Ruslando kie regas la pura ortodoksa kredo kaj kie demokratio estas realigata de sube. Supozeble Solĵenicyn en sia rolo kiel moralapostolo malsanis je la sama naiveco, kiun li riproĉis al aliuloj en aliaj rilatoj. Pro tio li ne atingis la samnivelan reputacion kiel morala aŭtoritato kiel tutmonde ĝuis ĝin ekzemple Andrej Saĥarov. Ĉi- lasta estis grava sciencisto eble iel komparebla kun Albert Einstein, dum Solĵenicyn restis sur la aŭtodidakta nivelo de lerneja instruisto sen signifaj sciencaj atingoj, malgraŭ siaj nekontesteblaj meritoj rilate la priskribon de la gulago. Kaj anstataŭ aktive helpi al la juna demokratio ekprosperi en la lando, kie la ŝtatprezidanto persone montriĝis malamiko de la libera parolo, Solĵenicyn kapitulacis kiel elĉerpita disidentulo kaj moralapogis dubindajn politikajn kaj spiritajn tendencojn, simile al religia sekto, kun ksenofobiaj kaj rasismaj akcentoj.

Vivo apud Moskvo

Solĵenicyn akceptis loĝi en „Sosnovka-2“ en la antaŭurbo Troice-Lykovo, kiu estis disponigita laŭ aranĝo de Elcyn. La surlokan daĉon Solĵenicyn transformis al iom luksa duetaĝa domo, kie troviĝis konvenaj ejoj kaj kie pendis la bildoj de Stolypin kaj Kolĉak. Laŭdire en tiu loko siatempe loĝis Lazar Kaganovciĉ (1893-1991), unu el la ĉefaj fiuloj de la neŭrozulo Stalino; laŭ alia fonto tie loĝis Miĥail Tuĥaĉevskij (1893-1937), kiu mem fariĝis viktimo de la stalinismo. Ĉi tie do la maljuniĝanta verkisto vivis, kvazaŭ sen kontaktoj kun la ekstera mondo, kun sia edzino Natalja Svetlova, kiu subtenis la famulon en la verklaboro.

Sed jam meze de la 90aj la publika intereso pri Solĵenicyn ekfebliĝis. Estis aliaj tempoj. Lia iom malfeliĉa kaj truda enmiksiĝo pere de montrofingraj moral-konservemaj argumentoj kaj ridindaj anakronismaj komentoj tedis la homojn. Nature sekvis la aljuĝo de diversaj ruslandaj premioj, kaj la verkisto mem disdonis premiojn je la propra nomo al iuj de li elektitaj verkistoj, kiuj meritis lian laŭdon. De Putin, unu plia obskura figuro de la rusa historio, kiu vizitis lin en lia hejmo kaj kiu evidente montris simpatian al la granda rusa patrioto, li konsentis akcepti la Ŝtatan Premion de la Ruslanda Federacio, aljuĝitan al li laŭ propono de „eksperta grupo de elstaraj rusaj sciencistoj kaj kulturagantoj“. Pri Putin la premiito cinike diris, ke malgraŭ sia pasinteco kiel KŜS-oficiro li almenaŭ ne estis komandanto en gulago.

Jam de jaroj Solĵenicyn ne plu akceptis ĵurnalistojn. Pro la „amikeco“ kun Augstein li konsentis fari escepton: en la jaro 2007 la verkisto bonvenigis du ĵurnalistojn de „Spiegel“, kiuj sukcesis fari verŝajne la plej lastan intervjuon kun la verkista giganto, kiu jam sidis en rulseĝo, kun korpo malforta, laŭ aspekto kiel sanktulo vaksfigureca en ortodoksa ikono. En tiu intervjuo la verkisto konfesis interalie, ke li estas konvinkita kritikanto de la partia parlamentismo. Kiel infano de la spirita rigorismo Solĵenicyn konsideris plurismon kiel ĝenon kaj aliajn opiniojn kiel pedagogian defion (Sonja Zekri, *Süddeutsche Zeitung*).

Nenian plaĉon trovis en okcidento la plej lasta verko de Solĵenicyn pri la historio de la judoj en Ruslando *Ducent jarojn kune (Dvesti let vmeste, 2001/2)*. Ĉi tiu kontestata libro konfuzis la kritikantojn kaj postlasis strangan senton pri Solĵenicyn kiel debila antisemito. La provon de Solĵenicyn kulpigi ĉefe „neruse pensantaj“ popoltavolojn, precipe judojn, pro la bolŝevisma tragedio de 1917, Leonid Luks konsideras fiaskinta en sia recenzo, ĉar lia libro havas laŭ li nenion komunan kun objektiva historia analizo. La konsternita verkisto Vladimir Vojnoviĉ, ja agnoskante la fenomenon de Solĵenicyn en la rusa literaturo, nomis la verkon eĉ komplete „mensoga“ kaj malatribuis al la verkisto ĉian senton pri demokrateco. De pluraj flankoj Solĵenicyn ricevis la konsilon ne ludi kun la fajro de la antisemitismo, por eviti la malsenerigon de la entute pozitiva bildo pri si mem. Solĵenicyn ne sekvis la rekomendon. Sub la impreso de tiaj kritikoj li tamen iom prilaboris la duan volumon de sia prihistoria libro.

En 2005 ekprepariĝis, per la helpo de la Fondaĵo Aleksandro Solĵenicyn, la projekto eldoni la verkaron de Solĵenicyn en 30 volumoj ĉe rusa eldonejo.

Fino kaj morto

Iuj eĉ komencis dubi, ĉu la verkaro de Solĵenicyn entute havas ian literaturan-beletran valoron. Generale pri la verkaro de Solĵenicyn estas klare, ke Gennadij Zjuganov, la eterne hieraŭa ĉefo de la Komunista Partio de Rusio, pridubis ĝian objektiveton entute, sed tio estas alia afero. Antaŭ nelonge, la Komunista Partio de Sankt-Peterburgo eĉ kuraĝis postuli la sanktigon de Stalino kiel „patro de la popoloj“ fare de la rusortodoksa eklezio. Pli groteska postulo ne ekzistas. Kontraste al tiu perspektivo, Arseni Roginskij, prezidanto de la civitanrajta organizo Memorial, alte laŭdis la atingojn de Solĵenicyn rilate la ellaboradon de la stalinisma pasinteco kaj la forigon de la totalismo en Ruslando. Jes prave.

Okaze de la publika prezentado de la morta korpo de Solĵenicyn en Akademio de la Sciencoj alkuris ĉefministro Putin, Gorbaĉov, Primakov k.a. Dum la entombiga ceremonio kun paniĥido** laŭ la rusortodoksa rito, kiu laŭ la deziro de la forpasinto okazis en la Donskoj-monaĥejo en Moskvo, aperis Medvedev persone por kondolenci la familion. La rusa prezidanto subskribis ankaŭ dekreton pri bapto de strato laŭ la nomo de Solĵenicyn. Speco de ŝtata funebra ceremonio tie okazis, kun armeaj gardistoj kaj tri salutpafoj honore al la mortinto. Ankaŭ Jurij Luŝkov, urbestro de Moskvo, honoris la mondfaman verkiston kiel „fortan, unikan homon“. La rumana prezidento Traian Băsescu komunikis, ke Rumanio aljuĝos al la mortinto por ties „kuraĝo kaj digno“ la nacian ordenon. En la ĉeesto de kelkcent partoprenantoj, interalie socie konataj figuroj, la entombigo estis dismontrita tra la televido. Hazarde aŭ ne, la tombo de Solĵenicyn troviĝas apud tiu de la historiisto Vasilij Kljuĉevskij (1841-1911).

La kritika voĉo de iu ĉeestanto, kiu mesaĝis, ke dum la vivo de Solĵenicyn la ŝtato nenion faris por li, estas interesa. En sia tuta vivo la disidentulo celis eviti ricevi la ‚aŭspicion‘ de iu ajn politiko aŭ politikisto. Li komprenis sin artisto, ne politikisto.

Resume, konklude kaj honore

La komunaj trajtoj de Rytchĉu, Ajtmatov kaj Solĵenicyn estis ilia senlaca lukto kontraŭ la maljusto, kreita de absurdaj ideologioj; Solĵenicyn, la „netuŝebla animo“, la „plej lasta profeto“, kiel oni nomis lin, estis la plej radikala kaj senkompromisa el ili, kaj pro tio li suferis plej multe kaj plej longe, dum la aliaj ĝuis iujn privilegiojn, eble por atingi ion, kion Solĵenicyn ne povis atingi. Ili ĉiuj defendis ‚siajn‘ minoritatojn, kiuj riskis esti detruitaj de la tro potenca, kruela, brutala, senhoma ŝtato: Rytchĉu ‚siajn‘ ĉukĉojn, Ajtmatov ‚siajn‘ kirgizojn kaj eble aliajn, Solĵenicyn ‚siajn‘ gulaganojn. Stalino estis ilia komuna koŝmaro; ilia propra persekutado aŭ la persekutado de iliaj parencoj far la stalinismo estis ilia komuna sorto. Ilin eble diferencis la geografio, la unua devenis de nordorienta Siberio, la dua el meza Azio, la tria el suda Ruslando, sed ĉiuj tri estis profunde sovetiaj homoj, kun ĉiuj fortoj kaj malfortoj. Ĉiuj tri havis sufiĉe senperajn kontaktojn kun okcidento, ĉu devigajn, ĉu libervolajn, eĉ pasigante tie parton de sia vivo, kaj ili rilatis ankaŭ kun Svislando. Spite al ĉia fameco kaj moralo, la priomaĝitaj verkistoj restos ambivalencaj kaj kontestataj fenomenuloj, kiujn necesas nek gloregi, nek kondamni, sed diferencigi analizi.

La homaro perdis ĉijare tri nekutimajn kaj elstarajn literaturistojn kun gravaj mesaĝoj de eterna monda signifo. Ŝajnas, ke krom iuj sensignifaj esceptoj bedaŭrinde neniom el iliaj gravaj verkoj estis tradukitaj al Esperanto.

* rajono: teritoria subunuo kiel parto de distrikto.

** paniĥido: nocio mankas en PIV. Kutimo de la ortodoksa eklezio okaze de la morto de homo.

Ĉi tiuj tri nekrologoj estis kompilitaj surbaze de fidindaj fontoj en la rusa, angla kaj germana lingvoj.

© Andreas Künzli, 2008